Resumaro de

BEL-Konferencoj 2020

28/nov - 13/dec

En la reto

Resumaro de BEL-Konferencoj 2020

Kunordigis: Miĥaelo R. Bento

Enpaĝigis: Allan Argolo

Aŭtoroj:
Paulo Sergio Viana
Flávio Fonseca
Manuela Burghelea
Ivan Eidt Colling
James Rezende Piton
Ísis C. Okabe Piton

Gaŭĉa Esperanto-Asocio

Kun aŭspicioj de

Brazila Esperanto-Ligo
Brazila Esperantista Junulara Organizo

ENHAVO

ENKONDUKO 4

LA SCIENCO KAJ LA HOMO - Paulo Sergio Viana 6

NI ESTAS MUZIKO - Flávio Fonseca 8

KOSMOPOLITISMO - LA KAZO DE ESPERANTO - Manuela Burghelea.. 10

LA NOVA ELDONO DE MANLIBRO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO - Ivan Eidt Colling 12

O SACI - LA UNUA PORINFANA TITOLO DE MONTEIRO LOBATO EN ESPERANTO - DEFIOJ KAJ SOLVOJ - James Rezende Piton..... 14

LA ARTO KOMUNIKIĜI - Ísis C. Okabe Piton 18

ENKONDUKO

Kara leganto,

same kiel preskaŭ ĉiuj Esperanto-eventoj, ĉi-jare la BEL-Konferencoj, kiuj estis okazontaj en Porto-Alegro, pro la pandemio ne povis okazi fizike. En la 17-a de Marto, kiam ni anoncis, ke la renkontiĝo ne povos realiĝi en la antaŭe difinita dato, ankoraŭ estis nur ok koronvirusaj kazoj en la urbo, kaj ni intencis simple prokrasti la eventon al la dua duono de la jaro. Sed poste montriĝis, ke la afero ne solviĝos tiel rapide.

Nu, ne vere necesas regurdi, ke tamen el la pandemio fontis ne nur senfinaj problemoj, sed ankaŭ kelketaj bonaĵoj, interalie tuta erao de retaj Esperanto-aranĝoj. Ja nenio povas plene anstataŭi fizikan ĉeeston, sed ni ĝoju, ke la esperantistaro komencis vere eluzi la interretajn eblojn kaj plenigi la kalendaron per retaj eventoj, multe pli facile partopreneblaj ol la ĉeestaj. En tiu kunteksto, tute nature estiĝis ĉe ni la volo plu teni la torĉon kaj okazigi la BEL-Konferencojn virtuale.

Ni klopodis konservi la ĉefajn trajtojn de la evento en la virtuala versio: senpageco, senburokrateco, altkvalitaj prelegoj, post-prelegaj diskutsesioj. Nova ideo estas la poioma realigo en tri sinsekvaj semajnfinoj, por ke la partoprenantoj ne enuu sidante multajn horojn antaŭ la ekrano.

Krome ni decidis repreni la iniciaton aperigi elŝuteblan resumaron de la prezentoj. Ĉi-eldone la resumoj estas pli koncizaj, kaj anstataŭ redoni la tutan enhavon de la prelegoj, ili rolas kiel interesvekaj enkondukoj. Tiu pli modesta aliro tamen nenion perdigas, ĉar la prelegoj restos (re)spekteblaj ĉe Jutubo.

Konklude mi ŝatus simple danki al ĉiuj samideanoj, kiuj iel

kontribuis al la realigo de la unuaj virtualaj BEL-Konferencoj, aparte al Marco Aurélio Roncatti, kiu starigis la retpaĝon, al Allan Argolo, kiu enpaĝigis ĉi tiun resumaron kaj pretigis reklambildojn, al Manno Montanna, pro la ferma koncerto, kaj al tiuj, kiuj kontribuis per prelego kaj resumo: Paulo Sergio Viana, Flávio Fonseca, Manuela Burghelea, Ivan Colling, James Piton kaj Ísis Piton.

Ni plu laboru kaj esperu!

Miĥaelo R. Bento
1-a sekretario de Gaŭĉa Esperanto-Asocio (GEA)
Ĝenerala direktoro de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)

LA SCIENCO KAJ LA HOMO

Paulo Sergio Viana

Lastatempaj enketoj montris, ke la homoj ĝenerale ne fidas pri la Scienco. En 2018, la datumoj indikis:

- 35 % el la brazilanoj suspektemas pri la sciencaj asertoj;
- nur 13 % el la brazilanoj “tre fidas” pri publikigitaj sciencaj rezultoj;
- 75 % el la brazilanoj asertis, ke “kiam la scienco kaj la religio malakordiĝas, ili elektas la religion”;
- 23% el la brazilanoj konsideras, ke la scienca produktado malmulte kontribuas al la ekonomia kaj socia progreso;
- en la tuta mondo, nur 18% asertis, ke ili “tre fidas” la sciencon;
- en landoj kun alta grado de popola edukado, 77% el la homoj malfidas sciencon;
- en landoj kun granda ekonomia malegaleco en la loĝantaro (multaj malriĉuloj, malmultaj riĉuloj), la fido je scienco estas pli malalta.

Kial la homoj ne fidas sciencon?

1. Ĉar la scienco malofte prezentas absolutajn, eternajn veraĵojn.
2. Ĉar la homoj ne komprenas, kiel funkcias la sciencaj esploroj.
3. Ĉar la ’veraĵoj’ de scienco ŝanĝiĝas laŭ la tempopasado.
4. Ĉar ordinaraj homoj ofte ne komprenas la lingvaĵon uzatan de sciencistoj.
5. Ĉar ekzistas ankaŭ malhonestaĵoj en la scienca mondo.
6. Ĉar fakte ekzistas ankaŭ ’interesoj’, kiuj povas deturni la sciencan celon.
7. Ĉar ofte oni misuzas sciencajn asertojn por politikaj celoj.
8. Ĉar vera scienco ĉiam alportas pliajn dubojn kaj demandojn, kaj dubo timigas.

Kiun alternativon akcepti, krom scienco?

Dum jarmiloj, la homaro kontentiĝis per superstiĉaj kredoj kaj magiaj pensoj. Ĝis nun, plej multaj homoj senkonteste akceptas ekzemple la regulon: “se io okazis tuj poste, jen estas la kaŭzo”. La superstiĉoj kaj magiaj pensoj eĉ helpis la prahomon elteni iujn suferojn, dum la vivo.

Aliflanke, racia penso postulas grandan klopodon, ekzemple produkti racian “pruvon” pri la kaŭzo de iu fenomeno. Estas do pli facile kaj komforte akcepti tradiciajn kredojn aŭ la instruon de ĉioscia guruo. Kompreni sciencon postulas multe da studado kaj edukiĝo.

Tamen, tiu sama homo, kiu neas sciencon, uzas sian poŝtelefonon, sian aŭtomobilon, vojaĝas per aviadilo, englutas medikamentojn sufiĉe efikajn kontraŭ antaŭe mortigaj malsanoj - ne atentante, ke ĉiuj tiuj modernaĵoj ekzistas nur pro scienca laborado. Antaŭ 70 jaroj, la homa vivo en Brazilo daŭris mezume 50 jarojn; nuntempe, ĝi kreskis al 70 jaroj. Ĉi tio kaj multaj aliaj mirindaj atingoj ŝuldiĝas al sciencaj eltrovoj. Kvankam la scienco ne estas perfekta rimedo, tamen ĝi estas la plej efika, en la materia kampo.

Kio do mankas, por ke la homoj komprenu, ke scienco estas apoginda afero? Mankas Filozofio. Precipe Filozofio de Scienco, nome la parto de scienco, kiu klarigas, kiel funkcias la scienco. Oni devas lerni, kio estas “scienca metodo”. Oni devas lerni logikon, indukton, dedukton, silogismon kaj multajn aliajn filozofiajn konceptojn. Unuvorte, oni devas lerni la racian pensmanieron. Oni devas lerni ankaŭ, ke la homa vivo devas nepre enhavi ĉiam ian kvanton da dubo, eĉ se tio estas laciga mensa sinteno. Nur tiel la homaro povas evolui.

Platono, antaŭ longa tempo, aludis pri tio, kiam li verkis la “Alegorion pri Kaverno”. Ni devus legi kaj relegi tion, de tempo al tempo.

NI ESTAS MUZIKO

Flávio Fonseca

La muziko estas la plej influanta arto, ĉar kontraŭ ĝi preskaŭ ne ekzistas defendo. Oni estas ĉirkaŭitaj de muziko, kaj mergitaj en sonoj. Oni povas fermi la orelojn, tamen la muziko onin atingas per la haŭto.

Tion atestas la Mitologio, la Filozofio, la Scienco kaj eĉ aliaj artoj. Kaj estas grave studadi ĝin pli profunde, ĉar la kono pri la muzikaj elementoj liveras al la homo la kapablon pli klare kompreni la aliulon, la mondon kaj sin mem. Tiel, ĝi povas altigi la kvaliton de la komunikado kaj la bonfarton.

Pro tio, en tiu ĉi prelego Flávio Fonseca detaligas kelkajn muzikajn kaj psikologiajn konceptojn, kaj montras la eblan rilaton inter ili. Per instigaj kaj eĉ poeziplenaj metaforoj li sugestas praktikajn manierojn apliki tiajn metaforojn en la ĉiutaga vivo.

Ekzemple, estos tuŝataj muzikaj temoj kiel:

La difinoj de sono kaj de muziko. Sono estas produktita de ia materia vibrado, ĉu regula ĉu neregula. Kaj muziko estas la konscia organizado de la sonoj ene de tempolimo.

Se ankaŭ la homaj estaĵoj vibras kaj havas sian propran frekvencon, la homaj rilatoj povas esti konsonancaj aŭ disonancaj. Tamen, same kiel okazas ĉe muziko, la disonancaj kombinoj povas fariĝi belaj (kaj taŭgaj) se ili estas parto de io aŭ vojo inter du konsonancaj pecoj.

La tri elementoj de la komponarto estas melodio (sinsekvo de muziknotoj), harmonio (sinsekvo de akordoj) kaj ritmo (ĉio kio rilatas al tempo, kel daŭro de muziknotoj kaj akordoj, ties kombino, rapideco de la tuto, akompanaj sonoj je neregula frekvenco ktp). Kaj tri el la personecaj aspektoj de la homoj, inter

la plej gravaj, estas emocio, racio kaj kinestezo. Tiel, kiu pli ŝatas melodiajn komponaĵojn, tiu pli emas al emocia sinteno; de kiu la harmonio plej altiras la atenton, tiu verŝajne preferas la intelektajn rezonojn; kaj la fizikaj korpaj sensoj estas la ĉefaj perceptoj de tiu, kiu unuavicigas la ritmon. Tial, en psikologia konsultejo oni povas interveni per sugesto, ke la paciento aŭdu tian aŭ alian muzikaĵon, laŭ lia/ŝia neceso prilabori iun personecan karakteron.

Tio kondukas al la konkludo, ke oni havas respondecon pri la muziko kiun oni aŭdas kaj aŭdigas, ie ajn. Ĝi kapablas modifi la ekvilibron, variigi la humoron kaj forte impresi la homon.

Jen kelkaj psikologiaj temoj kiuj tuŝas la homajn rilatojn, laŭ efektoj de la sona medio sur la homo.

KOSMOPOLITISMO - LA KAZO DE ESPERANTO

Manuela Burghelea

Ĉi tiu prelego pritemas kosmopolitismon, kun fokusiĝo pri facetoj reliefigitaj en la kazo de Esperanto. Kontraŭ longtradicia fono de esencismaj naciaj rakontoj, studado de tiu kazo estas maniero superpaŝi la kadrojn de naciaj analizunuoj cele al novaj perspektivoj, kiujn malfermas kosmopolitaj aktoroj. Estas analizata tio, kiel Esperanto-parolantoj spertas identecojn, apartenojn kaj hejmsenton.

Tiun etnografion de kosmopolitismo antaŭas teoriaj konsideroj formiĝintaj en sociaj sciencoj, kiel kuntekstiga superrigardo.

Reen spurebla al Kanta filozofio, kosmopolitismo estas la fina celo de historio, al kiu homaj kapabloj disvolviĝas. Ĝi estas “identiĝo kun la mondo aŭ kun la homaro kiu superas lokajn engaĝiĝojn” (Wardle 2015). En humanisma perspektivo kun emfazo je aktiveco kaj libera volo de kosmopolito, ĝi povas esti interpretata kiel “tipo de spaco por homa esprimo kaj por individua emancipiĝo kiu promesas liberigon de la enprizonigo en kulturo kaj komunumo, en lando kaj eklezio, en klaso kaj kategorio” kaj kiu kontemplas vivon de “moviĝo, volontulismo kaj plenumo” (Rapport 2012). Ĝi signifas “volemon rilatiĝi kun Aliulo” kaj samtempe “aferon de kompetenteco”, “personan kapablon trovi sian vojon en aliaj kulturoj, per aŭskultado, rigardado, intuiciado, pripensado” (Hannerz 1990).

Se adoptiĝas la vidpunkto, laŭ kiu kosmopolitismo estas humanisma projekto, tiam elvokiĝas eĥoj de Zamenhofa homaranismo. Se la akcento staras je orientiĝo de kosmopolitismo al individuo, tiam la intereso kuŝas en la analizado de ties diversaj mondoj, elektitaj aŭ kreitaj. Kie situas kosmopolitismo en la kazo de Esperanto, inter komunumo kaj individuo?

Esperantologoj adoptis la kosmopolitan paradigmon plurfake. Esperanto prezentas “kosmopolitigitan parolkomunumon” (Fettes 2013); ĝi estigas propedeŭtikan valoron kiu baziĝas sur ĝia kapablo stimuli kosmopolitan pensmanieron pri lingva diverseco kaj metalingvistika komunikado. Kun programo celanta kreadon de dulingva kosmopolitismo, kontraste al unulingva imperiismo, “Esperantismo ĉiam signifis duoblan civitanecon inter la nacieco kaj la kosmopoliteco de individuo” (Nagai 2010). Kiel versio de “psikoanalitika kosmopolitismo”, Esperanto estas “perparola terapio”, kiu sin proponas kiel praktikan solvon al la aliuleco kiu ekzistas en kaj ekster ni. Ĝi ankaŭ povas esti konsiderata “rolludo”. Tiel, por ke Esperanto-renkontiĝoj okazu plene kosmopolite, du ĉefaj roloj devas esti ludataj de Esperanto-parolantoj: la Aliulo kaj la Samideano (Fians 2018), aliuleco estante tiamaniere ankaŭ kerna kondiĉo kaj morala respondeco en la kreado de internacieco.

Sur tiu fono, naskiĝas demandoj rilate identiĝojn kaj lojalecojn. “Brazilano laŭleĝe, Esperantisto laŭkonvinke” (el Silas) starigas la demandon, kiel Esperanto-parolantoj alĝustigas nacian apartenon al kosmopolita projekto. Ĉu eblas esti “kosmopolita patrioto” (Appiah 1997)?

Por kelkaj, Esperantujo iĝas “virtuala patrio” aŭ “hejmlando”, “lokita kie ajn homoj parolas Esperanton” (Okrent 2005). El tio rezultas, ke Esperanto funkcias kiel ilo por senti sin hejme en la mondo. Ĝin akompanas moviĝeblo. “Kie mia piedo, tie mia patrio”, en la vortoj de la esperantista bildrakontisto Serĝo Sir', kies blazonsignaturo estas heliko. Ne nepras tamen esti globtrotulo por esti kosmopolito, tio sperteblas ankaŭ sen eliri sian domon, pere de gastigado (Pasporta Servo), legado (Esperanto-sumooj) aŭ retumado (Eventa Servo).

En transiro el UK-oj al ciferecaj mondoj, kosmopolitaj praktikoj de Esperanto-parolantoj ankaŭ ŝanĝiĝas, streĉante spacon kaj imagon kaj profundigante komprenon de hejmsento, kiel analizote en ĉi tiu prelego.

LA NOVA ELDONO DE *MANLIBRO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO*

Ivan Eidt Colling

En 2003 aperis la unua eldono de *Manlibro pri instruado de Esperanto* kadre de projekto *Flugiloj de Malfacila Vento*, de ILEI. La inspiro por la nomo de tiu projekto estas la Zamenhofa poemo La Espero, sed ĝi atentigas pri tio, ke tre ofte malfacilas la vento, t.e. la por-Esperanta agado, specife la laboro por instruado de Esperanto – kelkaj el la problemoj tiam listitaj estas: lingvonivelo de instruemuloj, manko de junaj Esperanto-instruistoj, manko de instrumaterialoj taŭgaj por junuloj, manko de subvenciado, malfacileco veki intereson de la publiko pri eklernado de la lingvo, aŭ de komencintoj pri progresado en la lingvo. La projekton starigis la tiama estrarano de ILEI pri junulara agado, Hokan (Håkan) Lundberg. Unu el la ĉiam menciataj rezultoj de la projekto estas ĝuste la *Manlibro*.

La libro estis kreita rete, en kunredakta medio; la unuan PDF-aranĝan version redaktis Stefan MacGill. La dua versio aperis libroforme, kun multaj kompletigoj kaj sub redaktado de Katalin Kováts. Estis tri eldonoj de la libro: en 2003, en 2005 (kun represo) kaj en 2009, kun entute ĉirkaŭ 2000 ekzempleroj. De jaroj *Manlibro* ne plu estas aĉetebla; cetere, multo ŝanĝiĝis en la maniero lerni kaj instrui ekde la lasta eldono antaŭ dek unu jaroj. Pro tio, ILEI, Edukado.net kaj E@I decidis reverki, ĝisdatigi la libron, cele al disponigo de la kvara eldono, kiu baldaŭ estos havebla. Ĉi tiu kvara eldono estas konsiderinde ampleksigita: la 3-a eldono estis 160-paĝa, la nuna estas 352-paĝa. Novaj kontribuaĵoj venis ĉefe de D-ino Katalin Kováts, kiu ne nur estis la redaktoro, ĉefa motoro de la tuta laboro, sed mem aŭtoras 54 procentojn el la 170 tekstoj de la libro, kiu enhavas kontribuaĵojn de entute 20 aŭtoroj el 13 landoj, de desegnisto el Argentino/Japanio, enpaĝigisto el Brazilo, de sep

provlegintoj/korektintoj el sep landoj, kaj ĝi estos presita en Slovakio, do temas pri sufiĉe ampleksa kaj multlingva, multkultura teamo.

Mi intencas prezenti la *Manlibron*, kiu laŭ mi estos epokfara verko. Ĝi ja estas unikaĵo en Esperanta fakverkaro, kaj kovras ampleksan gamon de temoj, de teoriaj kaj historiaj aspektoj (ĝeneralaj kaj specifaj pri Esperanto-instruado) al praktikaj aspektoj kaj konsiloj de spertaj instruistoj de nia komunumo.

O SACI - LA UNUA PORINFANA TITOLO DE MONTEIRO LOBATO EN ESPERANTO - DEFIOJ KAJ SOLVOJ

James Rezende Piton

La sasio estas la plej populara inter la brazilaj mitologiaj figuroj. Tiu koboldeto respondecas pri ĉiaj malagrablaĵoj, kiujn oni povas sperti en la ĉiutaga kampara vivo - jen li forpelas ĉevalojn aŭ plektas iliajn harojn, jen li rompas kudrilojn, malaperigas tondiletojn kaj faligas fingringojn de kudristino, jen li ruinigas laktobotelon aŭ bruligas preparatan manĝaĵon, malkovigas ovojn de kokinoj i.m.a. imageblaj petolaĵoj.

Tuĉdesegno de Monteiro Lobato (ĉ. 1917)

Oni konsideras la sasion en la brazila folkloro kiel individuon (tial “la” sasio), sed el pluraj raportoj de la legendo, oni komprenas, ke sasioj ĉiam ekzistas en granda nombro, ke ili vivas ne pli ol 77 jarojn kaj tiam ili ne mortas, sed fariĝas fungoj en la arbaro. Oni diras, ke la sasioj koviĝas interne de la tigopartoj de bambuo antaŭ la “naskiĝo”.

La sasio estas ekzemplo de sinkretismo en la brazila folkloro, same kiel okazis pri religioj. Tra la jarcentoj la mitologia estuleto heredis de origine indiĝena mito (arbara estuleto), ricevis influojn de la kulturo de afrikaj sklavigitoj (ekz. en la haŭtkoloro kaj la argila pipo) kaj de la portugala kulturo (ekz. pro ĝia ruĝa ĉapo, kies kaptanto rajtas konservi sasion en botelo, kiel dajmonon - aŭ ĝinon de la arabaj legendoj - kiuj cetere atingis Iberion dum jarcentoj).

Post jarcentoj tra la interno de tuta Brazilo, en iuj variantoj kiel sprita petolemulo, en aliaj priskribita kiel malbonulo eĉ kun du kruroj, la sasio atingis tute novan rangon komence de la 20-a

jarcento. José Bento Monteiro Lobato (1882-1948), advokato, bienulo, ĵurnalisto kaj verkisto, en 1916 aperigis artikol-serion en intelektula revuo kun esprimo pri zorgoj, ke la brazila elito tiam tro interesiĝis pri la fremdaj satirusoj, faŭnoj, leprekonoj k.s., dum tute riĉa loka mitologio estis apenaŭ konsiderata. En la sekva jaro Lobato faris enketon inter legantoj de la grava tagĵurnalo “O Estado de São Paulo”. Venis multaj reagoj ĉefe el la ŝtatoj Rio, Minas Gerais kaj São Paulo kun raportoj pri la bildo, kiun oni ricevis kaj faras al si pri tiu mitologia figuro. En 1918 li publikigis kompilaĵon de la enketo. Kaj la “averaĝa” sasio - malgranda, tre ruza kaj saltema nigra unukruruleto, kiu vivas en la arbaroj kaj kamparoj, kun ruĝa ĉapo kaj pipeto, farante bagatelajn malbonojn - en la sekvaj jaroj kaj jardekoj fariĝis laŭmoda kaj definitiva simbolo de la brazila folkloro.

Lobato estis polemika homo. Filo de bienula elito, li en la junaĝo simpatiis al eŭgenikismo. En liaj infanlibroj, de granda literatura valoro, same kiel lia literaturo por plenkreskuloj, registriĝis rasismaj asertoj kutimaj en tiu tempo. Aliflanke liaj roluloj havas estimon al la nigraj roluloj kaj li dediĉis la enketan libron pri sasio “al maljuna Onklino Esméria” (verŝajne lia iama vartistino) “kaj al ĉiu maljuna nigrulino, kiu timigis nin en infanaĝo per interesaj rakontoj pri mitoj”, kun samtempa malŝata aludo al enmigrintaj vartistinoj, kiu randas ksenofobion...

La verkaro de Lobato por infanoj, inter 1921 kaj 1947, ampleksas dudekon da originalaj libroj ĉirkaŭ la “Bieneto de la Flava Pego”. La proprietulo, Sinjorino Benta, kun la nepino Nazulinjo, la nepo Peĉjo (Petro), la afrikdevena kuiristino Onklino Nastasja, la ĉifonpupo Emilja (la alia mio de Monteiro Lobato, kiu tra ĝi senbride parolas) kaj la maizospika pupo, scienculo Vicgrafo Spikoza, konsistigas la ĉefan nukleon. En ĉiu titolo, multaj faktaj informoj pri la mondo kaj rezonado, kun konstanta zorgo instali kritikan penson pri la aferoj. Cetere Lobato reverkis aŭ tradukis klasikaĵojn kiel *Don-Kiĥoto de la Manĉo*, *Rakontoj de Fratoj Grimm*, *La Libro de la*

*Ĝang*alo, *Robin Hood* kaj *Alico en Mirlando* por faciligi la aliron de la infanoj. Lia influo sur la postaj generacioj estas grandega, kun tiel grava verkaro, ke Monteiro Lobato estas oficiale deklarita patrono de la brazila infanliteraturo kaj la 18-an de Aprilo, lia naskotago, oni celebras la Tagon de la Infanlibro en Brazilo.

En 2003, kiam mi fariĝis freŝa patro de Esperanto-denaskuloj, mi decidis ektraduki unu el la libroj de la serio, kun la celo redoni en Esperanto tiun fantastan universon de Monteiro Lobato, kiun mi ĝuis kiel infano. Mi elektis la titolon “La Sasio” pro la bona enkonduko al la serio. En ĝi la “Bieneto” (kiel preskaŭ ĉiu brazilano aludas al la hejmo de Sinjorino Benta) estas detale priskribita, same kiel trajtoj de la aliaj roluloj, la ĉirkaŭa riĉa naturo kaj la brazila folkloro.

Tiu riĉeco de detaloj estas koŝmaro (aŭ defia ĝuo, laŭ mia gusto) por tradukanto. Nia lando kalkulas je du mil birdospecioj (unu kvinono de ĉiuj birdospecioj de la mondo). En lando kaj fizike kaj kulture vasta kiel kontinento, estas pluraj nomvariantoj por bestoj. La esplorado, ĉu oni jam esperantigis bestonomon, preskaŭ ĉiam kondukas al respondo: - Ne. Konsekvenca elpenso de vorto, laŭ la zamenhofa metodo prefere utiligi la sciencan nomon, estas necesa. La nomo de la estulo mem - kaj cetere librotitolo - estis defia. Dum jaroj mi hezitis inter la facila “sacio” kaj la fonetika “sasio”. Mi ne kontentis pri la paŭsaĵo de la portugala, kiu en Esperanto rezultas en modifita sono de la originala tupia nomo (kaj sono de la portugala vorto mem!). Mi havis la okazon paroli pri tio kun spertulo pri tradukado kaj la brazila kulturo, karmemora akademiano Sylla Chaves. La atenta leganto jam rimarkis kiun alternativon mi elektis.

Ne malpli defia estas la redono de nomoj de roluloj. Tion alfrontas plej multaj tradukantoj de verkoj kun temo de nacia kulturo. Ekzemple, fuĝinta rinocero ekloĝis en la Bieneto kaj ties nomo estas “Quindim”. Ĉu en Esperanto estu tiu nomo laŭ la sono, per *Kindin’*, ĉu konformigo per *Kvindimo*? Tiam perdiĝas la amuza efekto de la aŭtoro, ke la afrika bestego havas nomon de delikata brazila dolĉaĵo (kies vorto estas ja afrikdevena). Ĉu ĝia nomo estus do

Kokosaĵo? Aŭ ĉu pli specifa, *Kustardo*? Mi elektis la lastan, por vastigi la vortoprovizon de niaj infanoj.

Pli fruan publikigon de la tradukaĵo malhelpis la aŭtoraj rajtoj, kiujn la familio de Lobato cedis al granda entrepreno. Estis provoj intertrakti pri tio, sed la afero ne prosperis. Ekde 2019, 70 jarojn post la forpaso de Monteiro Lobato, la verkaro fariĝis publika havaĵo. Pli ol 15 jarojn post la ektraduko - mia filo, al kiu mi legus la rezulton, jam tiom aĝas, ke li mem estas kapabla kontrollegi la tradukaĵon - mi faras demarŝojn por atingi la publikigon de *La Sasio* espereble en 2021 - precize je la centjariĝo de la publikigo de la unua versio de la originalo.

LA ARTO KOMUNIKIĜI

Ísis C. Okabe Piton

Ni ĉiuj lernis, ke homo estas socia besto. Nia ampleksa kaj kompleksa kapablo komunikiĝi malfermis al ni grandan gamon de ebloj por evoluado de nia specio. En la lastaj jaroj, kun la evoluado de la teknologio pli kaj pli kreskas la manieroj komunikiĝi pro la tutmonda interreta fenomeno, kaj nun des pli pro la koronviruso, ni pli bone ekspluatas tiun ĉi medion kaj atingas multe pli da homoj ol ni povus imagi.

Kiam la televidilo aperis, ĝi estis grandega bona novaĵo por scii pri tio, kion faras kaj kiel agas homoj de la tuta mondo, kaj nun ni povas eĉ paroli rigardante la mienojn de niaj kunparolantoj en alia parto de la planedo. Tio fakte estas mirinda!

La homaro nuntempe havas multe da rimedoj por komunikiĝi kaj lernas lingvojn aŭ uzas tradukilojn. Tamen, tiom da rimedoj ne estos efikaj se oni ne scias kiel efike komunikiĝi.

Tiu ĉi konferenco estas inspirita de ideoj prezentitaj de Katia Campelo, parolterapiisto kaj instruistino pri oratorarto, pri la temo “Efika komunikado, efikaj rezultoj”. Katia prezentis esploron faritan de Kalifornia Universitato en 1996 - 55% el la efikoj de nia komunikado estas kaŭzataj per nia korpa esprimo kaj 38% per nia parola esprimo kaj nur 7% per la enhavo de la temo. Tio montras, ke se oni ne scias komuniki efike, ne sufiĉas regi la temon. Nun ni havas multe por pripensi. Nia maniero agi kaj paroli forte kaptas la atenton de tiu, kiu nin aŭskultas kaj se la enhavo respondecas nur pri 7%, do multe pli grava estas la homo, kiu parolas, kiel nuntempe oni kutimas diri: “la aldonita valoro”. Tiun valoron esperantistoj komprenas, ĉar multaj el ni prizorgas nian planedon, aĉetas varojn, kiuj ne rezultis de infanlaboro, subtenas entreprenon, kiu replantas arbojn ktp.

La samo okazas al la servoj. Ekzemple, homon, kiu estas tre ĝentila, oni emas aŭskulti, pli ol tiun, kiu parolas agreseme. Tiu, kiu venas kun pretendemo, foje eĉ fizike videbla kun aroganta paŝado, ankaŭ donas al ni la unuan mesaĝon kaj el tiu mesaĝo oni jam pripensas ĉu oni aŭskultos aŭ ne, kaj multaj tiel agas nekonscie.

Nun venas la tempo por plibonigi tiun, kiu estas malantaŭ la ilo, tio estas, la komunikanto. Por tion fari, oni bezonas honeste koni sin mem: kia estas mia voĉo, la tono kiun mi uzas dum mi parolas, la vortojn, kiujn mi uzas, la intencon kiun mi havas kiam mi parolas, miajn sintenojn antaŭ miaj kunparolantoj - ĉu mi vere volas interkomprenon? Ĉu mi kapablas aŭskulti la “respondon” de tiu, kun kiu mi interrilatas? Al kiu apartenas la respondeco fari la mesaĝon transdonitan komprenita?

VIRTUALA BELKO 2020

La tradiciaj BEL-Konferencoj, sed ĉi-foje en la reto

28-29/nov 05-06-12-13/dec

Spektu realtempe ĉe:
youtube.com/esperantors

Organizas:

Associação Gaúcha de Esperanto
Gaúĉa Esperanto-Asocio

Aŭspicias:

Brazila Esperanto-Ligo

Brazila Esperantista Junulara Organizo
Bejo